



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN

Simpla : 7 fkoj } 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Bonfara : 12 fkoj } P.C.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MAJO - JUNIO

1967

3

KULTURAJ KAJEROJ

1967

MAJO - JUNIO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna repesaĵo.

ENHAVO

Post la paska kultura semajno F. Boyer

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

La submetado de Blanka Monto

Robert Houdin
majstro de la magiistoj (1) E. Motillon

Modernaj teknikoj :
Konservitaj homoj

La abatejo de Solesmes

Niaj poetoj
Ce l' laborej' de l'horlogisto A. de Orriols

Gravaj datrevenoj

La steloj
rakonto de paŝtisto A. Daudet
trad. S. Aube

Por via distro
Nia konkurso P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajn.
Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

La redaktoroj de **Kulturaj Kajeroj** partoprenas en la doloro de la tuta esperantistaro, okaze de la morto de Julio Baghy, kiu tiel afable helpis ilin per artikoloj kaj kuraĝigoj.

Post la paska kultura semajno U.F.E.-G.E.E.

Tiu kultura aranĝo okazas jam de pluraj jaroj en la Esperantista Kulturdomo kies celo estas ĝuste permesi tiajn renkontojn. Ĉi tiun jaron, mi ricevis la taskon organizi la pedagogian programon por la oficialaj partoprenantoj de tiu restado, kaj planis la okuparon por ke tiu mal-longa restado donu sufiĉan profiton.

En tiaj cirkonstancoj, malfacilaĵoj povas okazi, kiam kunvivas personoj kiuj devas serioze labori kaj personoj kiuj ferias kaj deziras ripozi, promeni, babili (nacilingve) kaj, vole nevole de-logas la staĝanojn.

Sed feliĉe, en la kulturdomo la etoso estis sufiĉe fervora por ke la kunvivo estu ne nur ebla sed eĉ profitdona por ĉiuj. La ripozemuloj ripozis, la laborenduloj laboris kaj la tuta ĉeestantaro kunvivis en esperantlingva « klimato ».

Mi scias, ke la direktoro ne faras ĉion, sed tamen mi kredas, ke la interna regularo, la ride-tanta aŭtoritato de S-ro Babin, permesis tiun sukceson, kaj mi ŝuldas multajn dankojn al la tuta stabo de la esperantista kulturdomo.

Dum tiu restado, la partoprenantoj uzis la lingvon internacian, havis la okazon ĉeesti ling-vajn kursojn kaj pedagogiajn aranĝojn, kaj ĉiu-vespere okazis kunvenoj, kie intermiksiĝis agra-blaj seriozaĵoj kaj kulturaj distraĵoj. Tial, mi opinias, ke se U.F.E. sukcesas denove organizi tiajn restadojn, multaj esperantistoj povas pro-fiti el tia partopreno. Junaj, pli malnovaj kaj eĉ ĉiamaj junuloj estas invitataj, sed la junaj aŭ maljunaj seriozemuloj ankaŭ estas petataj par-topreni. Ju pli diversa estos la loĝantaro despli fidele ĝi spegulos la esperantlingvan popolon (mi ne devas forgesi la specialajn dankojn al la brita ĉeestantaro, kiun neniu forgesos), kaj tiam ni povos diri al ĉiuj ke ni vere organizas restadojn en Esperantujo, kies la Esperantista kulturdomo estas unu el la plej elstaraj renkontejoj.

La pedagogia organizinto
de la kultura semajno

F. BOYET



ĈU VI MALFRUAS ?

TUJ SENDU VIAJN

Abonojn al

la peranto en via lando aŭ

al : **P. BABIN**, 13, Bd de la Chauvinière
44 - NANTES p.k. Nantes : 2.813.61

Esperanto tra la Mondo



Morto de elstara esperantisto kaj granda poeto :

La 18-an de marto mortis en Budapeŝto Julio Baghy, kies vivo estis ligita al nia movado depost pli ol 50 jaroj.

De li aperis dudeko da poemlibroj kaj romanoj kaj krome, Baghy prelegis kaj instruis esperanton en preskaŭ tuta Eŭropo.

Kun Kalocsay, li estis unu el la « gigantoj », kiuj starigis la bazon de la esperantlingva literaturo.

Someraj renkontoj :

— En Sovet-Unio : esperanto-tendaro en la ĉefurbo de Soveta Litovio, Vilnius, (29-7 9-8). Adreso : Sro A. Poška, Smelin 26-15, Vilnius, USSR.

— Esperanto-tendaro en Uzbekistano (en montaro, je 60 km. de Fergana). Adreso : Sro Poliščuk, ul. Novo-Moskovskaja, 18 kv. 15, Taŝkento, USSR.

— Eŭropa ferio-semajno, 3-9 de septembro, sur la monteto Boldern, ĉe la Zurika lago. Adreso : Ernst Glättli, Laurstr. 17, C H 5.200, Brugg, Svislando.

— Internacia esperanto ferio en Międzygorze (Pollando), unu aŭ du semajnojn inter la 20a de septembro kaj la 3a de oktobro. Adreso : Pola esperanto-asocio, okcidenta regiono, P.K. 8, ul Dubois 3, Uroclaw 77.

— Aŭtunaj feriaj esperanto-kursoj, en Aarhus (Danlando), 15-21 de oktobro. Adreso : Sro L. Friis, Ingemannsvej 9, Abyhøj, Danlando.

— Amika renkontiĝo, en Szolnok (Hungario), 19-22 de aŭgusto. Adreso : Fremdultrafika oficejo, Kossuth ter 9, Szolnok, Hungario.

— Amika renkontiĝo en Jihlava (Ĉeĥoslovakio), 16-19. 7 kaj posta ekskurso busa. Adreso : Mest N. V., Komisiono por Trafiko, Jihlava.

— Internacia pedagogia esperanto-seminario, en Szeged (Hungario), 10-20 de aŭgusto. Adreso : Pedagogia grupo de HEA, Szeged, Aprilis 4 Utja I, Hungario.

El orienta Germanujo :

Pli ol 200 geesperantistoj, inter kiuj eksterlandanoj, partoprenis specialan kunvenon, en la kadro de la Internacia Foiro de Leipzig. Oni anoncis la baldaŭan aperon de esperanto-vortaroj kaj lernolibro en D.D.R.

El Nord-Vjetnamio :

Fondita en 1956, Vjetnamio Pacdefenda esperantista asocio, jam distribuis 2.500 unuagradajn kaj pli ol 700 duagradajn atestilojn pri lernado de esperanto.

El Francujo :

Okaze de la 59-a Franca Kongreso de Esperanto, Sro Llech-Walter estis elektita Honora Prezidanto kaj ricevis de la urbestro de Calais

la oran medalon de la urbo. La nova prezidanto de U.F.E. estas D-ro Albault.

Novaj eldonaĵoj :

— Sub aŭspicio de UEA, reaperas la revueto « Gepatra bulteno » por la esperantaj familioj. Jarabono (4 ilustritaj numeroj) kostas 14 steloj, pagebla per UEA.

— « Romeo, Julieta kaj la tenebro », romano de Jan Otčenášek, tradukita el la ĉeĥa de Vladimir Vaha.

(Travivaĝo dum la nazia okupado, en Prago).
— « Dorse kontraŭ la muro », milittempaj rakontoj de P. Wybenga. Eldonis Frisa Akademio.

— « Cielarko », versa prezentado de fabeloj el diversaj popoloj, lasta verko de Julio Baghy.

— « Jaroj sur tero », memoraĵoj de la hinda esperantisto, Lakshmiwar Sinha.

— « La felico » kaj 6 aliaj kantoj de Ramona van Dalsem. Eldonis UEA ; malmola disko 33 r/m. 10 steloj.

Pri la fakoj :

— Kreiĝis Internacia ligo de la esperantis-toj-kolektantoj. Adreso : Bulv. Lenin, Nr. 83/107-3, Sofia 13, Bulgario (ĉe Sro Levičarov).

— Filatela ekspozicio, okaze de la 50a datreveno de la oktobro-revolucio, en Karl-Marx Stadt, D.D.R., 6-15 de oktobro. Okazos specialaj manifestacioj por la esperantistaj filatelitoj. Adreso : Dr Otto Nuschke Str. 6, Karl-Marx Stadt, D.D.R. 90.

— La asocio de Sonbendamikoj esperantaj havas nun 140 membrojn en 24 landoj. Adreso : Ge-roj Stephenson, Crutchfield Brae, Hookwood, Horley, Surrey, Britujo.

— Rilatu kun OE 3 RU Rudolf Bartosch, A-3.812 Gr. Siegharto, Aŭstrujo, por fondo de internacia ligo esperantista de radio-amatoroj.

— Internacia Teknika ligo kreiĝis. Adreso : Sro Andreev, Leznica (Razgrad) Bulgario.

Ĉu vi konas la revuon « Kemio Internacia » ?

Ĝi estas la sola naturscienca revuo, certe altnivela, en esperanto. Ĝi bezonas ne nur abonojn de esperantistoj sed ankaŭ de teknikaj institucioj kaj reklam-anoncoj de firmaoj.

Adreso : Urugvaja esperanto-societo, Casilla de Correo 1.040, Montevideo.

Aliaj « Esperanto » aŭ « Zamenhof » stratoj...

En Fulda Schwelm kaj Hilders (Germanujo), en S. Felin de Codinas (Hispanujo), Rio Ceballos (Argentino), Chorzow (Pollando), Albenga kaj Verona (Italio).

Ĉu baldaŭ en via urbo ?

La submetado de Blanka Monto

Malgraŭ kelkaj ribeloj, teruraj ankoraŭ nuntempe, la Reĝo de la Alpoj estas venkita. Du observejoj estas konstruitaj sur ĝia supro. Sed tiu akiro kostis la vivon de multaj kuraĝegaj esplorantoj altiritaj de la grandeco de la entrepreno, logitaj de la nekonateco.

Profunda estas la ĉiela bluo en unu el tiuj tagoj helaj kaj lumaj, kiuj sekvas someran pluvon. Tamen de Dijono, St. Stefano, Belforto, Mulhaŭzo, oni povas ekvidi malproksime, tute malproksime, kie la suno tuŝetas la teron, malgrandan nubeton tute blankan, maldikan neĝan flokon, kvazaŭ velon de malproksima ŝipo haltiginta en ia mistera haveno.

Vespere, kiam la Okcidento ekflamiĝas je la grandega brulado de l'subiranta suno, la malgranda floko ekbrulas, lumas je ruĝega fajro, brilas, kiel multekosta ŝtono, rozkoloriĝas iom post iom, paliĝas, elĵetas helon lastan kaj subite estingiĝas.

La supro de Blanka Monto — ĉar ĝi estis la malproksima foka nubeto — siavice forviŝiĝis en la mallumajon.

Nun ni alproksimiĝu. Ni rigardu la Blankan Monton de Liono, de Juraso, de Genevo. Kiam oni levas la okulojn, oni vidas la konturon de ĝiaj lumaj akraĵoj, la brilegon de ĝiaj flankoj ; tiam ĝi ŝajnas vere strange, supernatura. Ni admiru ĝin inter la grandeguloj, kies reĝo ĝi estas. Efektive ĝi estas la blankhara Karolo — la — Granda, drapirita per ermenajo, grandega pro sia maso kaj aĝo, tiu, ĉirkaŭ kiu grupiĝas, kliniĝas teren multego da submetitaj princoj kaj da humilaj vasaloj. Ĝi ja eltiris de poeto la jenan konfeson « Ifoje mi tentata estas alsaluti Blankan Monton : Via Reĝa Moŝto ! » L'impreso, kiun oni eksentas ĉe la piedo de Blanka Monto sub la pezo de ĝia premanta majesteco, estas impreso tute aparta, kiun oni ne povas kompari kun ia alia, krom tiu, kiun oni ricevas de la rigardado de Oceano ; impreso samtempe ravanta kaj korpremana, kiun oni elportas kvazaŭ ĉirkaŭpremon, ne povante nek volante eltiri sin de ĝi. Oni eĉ ne bezonas fiksadi la okulojn sur la koloson ; ne vidante ĝin, oni eksentas apud si tiun najbaron grandegan kaj belegan.

Ĝi estas ombro kiu altiras nin. Tiu najbareco senspiradigas la bruston kaj pezigas sur l'animon ian strangan premadon

neesprimeblan. Tial, kiel strange estas ke, dum jarcentoj kaj jarcentoj, oni eĉ ne suspektis la ekziston de Blanka Monto. Tamen tio ĉi estas reala fakto. Ĝis la fino de la 19-a jarcento Blanka Monto ne estas metita sur la landkartoj ; ĝi ne havas nomon. Afero neverŝajna, tamen vera : oni ne estis vidinta ĝin. Kaj por ke oni alportu l'atenton sur ĝin ne sufiĉis, ke fariĝu revolucio en la gusto, ke oni rekomencu admiri la belajojn de l'Naturo kaj ĝiajn « majestajn terurigaĵojn » ; al la Scienco apartenas la merito esti entrepreninta la eltrovon de Blanka Monto.

La unua, scienculo H.B. de Saussure, projektis submeti ĝin. Saussure naskiĝinta en Genevo en 1740 estis naturisto. Trakurante Alpojn por lernadi la fizikon, la geologion, la botanikon, li komprenis sen peno, ke necese estas supreniri Blankan Monton por ricevi novajn kaj decidigajn rezultatojn. Sur ĝian supron oni devas lernadi la mondon de l'glaciejoj, la termometrajn ŝanĝojn, la influon de la maldensigo de l'aero.

De l'tago kiam tiu ĉi ideo atingi la supron de Blanka Monto ekeniris la spiriton de Saussure, ĝi loĝadas tie kaj tute ĝin okupas ; ĝi fariĝas neŝance la ideo : persekutado.

« Miaj okuloj ne povas renkonti Blankan Monton, kiun oni vidas de tiom da punktoj de niaj ĉirkaŭaĵoj, li mem diris, ne eksentante ian eksciton ». Jam dum sia unua vojaĝo en Chamoni (Ŝamoni) en 1760, li publikigas en ĉiuj paroĥoj de la valo, ke li donos grandan rekompencon al kiuj trovos eblan vojon por atingi la supron de Blanka Monto.



Enirejo de la Tunelo (Franca flanko)

De tiu ĉi alvoko ĝis la fina sukceso, pasis pli ol unu kvarono da jareento. Dum tiuj dudek kvin jaroj, multe kaj multe da karavanoj organiziĝis, kiuj fine devis konfesi sian nepovadon. Kuraguloj, fortikaj montanoj, ĉasistoj de ĉamoj, malsupreniris post vanaj penoj. Pensu do iom pri tio ! Eĉ hodiaŭ, supreniro sur Blanka Monto estas ĉiam entrepreno malfacila ! Sed tiam ĝi certe ŝajnis senenca kaj riskoplena por ne diri neebila. La glaciejoj kaj la akraĵoj, kiuj superas ilin, estis tiel malmulte esploritaj, kiel la glacirifoj de Norda Poluso. Oni ne havis ilojn por helpi kaj ŝirmi sin : nek ŝnurojn, nek glaciĥakilojn, nek krampojn, nek blujajn okulvitrojn por ŝirmi la okulojn, nek skalojn (movŝtuparojn faritajn el du stangoj interligitaj per bastonetoj uzatajn kiel ponton super fendajoj) por transiri la fendegaĵojn.

Fine, al ĉiuj efektivaj danĝeroj aldoni aliajn multe pli timigajn : la danĝerojn imagajn. Tiuj neesploritaj regionoj laŭ la tradicio estis la reĝejo de malbonaj genioj, kiuj defendis sin per teruraj rimedoj kontraŭ la almlilitata homo. Ili malfermis senfundajn profundegaĵojn sub la piedoj de la multimulo ; ili faligis sur lian kapon lavangojn el neĝo aŭ el rulantaj ŝtonoj ; ili erarigis lin en la nebuloj, perdigis al li la saĝon per la kapturono, aŭ ekdormigis lin je peza dormo el kiu oni ne vekiga plu.

Ĉiujn tiujn kunigitajn danĝerojn homo sola kuraĝas kontraŭbatali. Vera heroo li estas. Lia nomo estas Jacques Balmat — lia aĝo : dudek — kvar jaroj. Li ankaŭ estas turmentata de la « blanka talpmonteto ». Fine, ian tagon, alveninte kun karavano, kontraŭ ĝia konsento, ĝis « le Grand-Plateau (granda plataĵo) » li serĉas la malfortan punkton de la neatingebla murego ; komence li suriras ĝis la intermonto « le Dôme » (la kupolo), sed la krutegaĵoj de la deklivoj de « les Bosses » (ĝiboj) terurigas lin, li malsupreniras ĝis le « Grand-Plateau » kaj fine elektas la deklivon, kiu kuŝas laŭlonge de la dekstra flanko de « Les Rochers Rouges » (ruĝaj ŝtonegoj). Post irado terure

laciganta, li komprenas, ke li estas sur ĝusta vojo. La supro estas tute proksima.

Sed la nokto alvenas, la nebulo densiĝas, la ventego blovegas. Balmat ne kuraĝas antaŭeniri plu. Li volviĝas en neĝan kavaĵon, sur la bordo de fendegaĵo ; kaj sola, sen nutraĵo, jam pasiginte tri noktojn, vagante sur la flankoj de la monto, li atendas la tagiĝon, certa ke se li ĉesos eĉ unu momenton frotadi sin kaj konservi en si mem iom da varmo, ke se li cedos je la dormo, la morto lin kaptos. La matenruĝo aperas. La ventego trankviliĝis Balmat ekpensas daŭrigi la supreniradon. Sed liaj kruroj fleksiĝas ; liaj okuloj brulitaj ne vidas plu. Necese estas malsupreniri. Sed sensignifa tio estas, ĉar de nun certa estas la sukceso. Post kvin semajnoj, Balmat ree kune kun unu el siaj amikoj, doktoro Paccard, alvenas ĝis la punkto atingita de Balmat en lia antaŭa esplorado. Tie la doktoro, tute malfortigita jesigas, ke li ne iros pli antaŭen. Balmat daŭrigas kaj batalante kontraŭ la fortego de la vento, ekpaŝas sur deklivon, kiu senfina ŝajnas al li. Fine, jen li estas sur akraĵo mallarĝa kaj longa, en azendorsa formo. Jen ĝi ! Nun li povas levi siajn rigardojn : nenio plu estas super li, nenio krom la ĉiela arkaĵo.

Li superas la tutan Alparon, kies deklivojn de ĉiuj flankoj li vidas mallevigintajn. Sub liaj piedoj kuŝas Genevo, Italujo, tuta mondo da ebenaĵoj. Li atingis la celon. La revon tiel longe karesitan li efektivigis. La aferon provitan de multaj aliaj, konsideritan de ĉiuj kiel neebilan, li plenumis. La unua li spiris tiun aeron je kiu nenio homa brusto jam ŝveliĝis. La unua li premas piede tiun neĝon ankoraŭ virgan. La unua li posedas tiun kronon netuŝitan kaj la unua li venkis la Naturon. Estis unu el tiuj solenaj minutoj, kiajn malmulte da homoj havis la feliĉon pasigi, minuto kiam la koro estas plena je prava fiereco, je triumfa ĝojo.

(El la revuo : *Legaĵo por ĉiuj*.)

Trad. de Dumont kaj Bojadjian).

ROBERT-HOUDIN Majstro de la Magiistoj

LA JUNULAJ JAROJ

Dum la lasta jarcento, tiu nomo : Robert-Houdin famiĝis ne nur en Francujo, sed en la tuta mondo. Tiun vastan renomon akiris unu el la plej eksterordinaraj homoj de tiu epoko. Tiam scienco kaj tekniko faris neatenditajn paŝojn antaŭen. Oni povas diri ke, estiĝis apogeo de racia rezonado aplikata al la konkero de la naturaj fortoj.

Kontraste al tiu ondo de praktika raciismo, Robert-Houdin iel konkretigis, kaj satigis tiun profundan eternan deziron de la homoj al poezio, revo, mirindeco, supernaturo, mistero.

Oni nomis lin : « sorĉisto, magiisto ». Li mem, en la intimeo, pretendis esti nur « iluziisto » aplikanta nur naturajn, fizikajn kaj psikologiajn leĝojn. Li renovigis la antikvan arton de « blanka magio ». Eĉ lia arto ricevis novan nomon — kredeble de li mem inventita — « prestidigito ».

Dum la jaro 1805a, en centra Franclando, en Blois, naskiĝis en familio de juvelistoj-horlogistoj Johano-Eŭgeno Robert.

Lia patro edukigis lin en kolegio, kie li fariĝis elstara lernanto. Ricevinte siajn diplomojn, oni havigis al li oficon ĉe notario. Tio ja ne plaĉis al la junulo, ĉar li ĉiam revadis pri horlogarto kaj mekaniko. Tial, li baldaŭ forlasis la notariejon kaj dungiĝis ĉe fama horlogisto en Tours. Tie li ellernis sian metion kaj komencis studi mekanikon.

Hazarde li legis libron, kie estis priskribitaj kelkaj el la jongaĵoj kaj artifikajoj uzitaj de la tiamaj « sorĉistoj » kaj « magiistoj », foiristaj « artistoj », kiuj vagadis de urbo al urbo.


Allogite kaj nature scivolema kaj aventurema, li decidis elstudi tiun arton de iluzio. Tiucele li vojaĝis kiel helpanto kun tiaj sorĉistoj. Tiel, li ellernis la manipulado de malgrandaj objektoj, kaj rapide fariĝis pli lerta ol liaj instruantoj.

— o —

LA AŬTOMATOJ

Post ses monatoj, li ĉiom sciis el la sekretoj de la iluziistoj. Li iris en Parizo, kie li denove profesiis kiel horlogisto. Post kelka tempo, li edziĝis je Cecilia Houdin, filino de lia tiamaj mastro. Lia boparto estis ankaŭ fervorulo pri mekaniko, kaj finance helpis sian bofilon por konstruado de aŭtomatoj.

Tiu-ĉi, aldoninte la nomon de la edzino al la sia, rapide famiĝis laŭ la nomo Robert-Houdin. Pli poste, tiu nomo estis leĝe oficialigita.



Robert Houdin laŭ litografio de Léon Noël (1848) (je lia dekstra flanko, la aŭtomato : desegnista-skribisto »).

La aŭtomatoj de Robert-Houdin intrigis kaj amuzigis la tutan parizan loĝantaron. El tiuj mirindaj « kavazaŭ-homoj » ni citu : akrobatojn, klaŭnojn kiuj fumis pipon kaj ludis per ŝalmeto, k.a. La pli eksterordinara estis la « skribisto-desegnisto ». Ĝi similis viron laŭ reala grandeco, sidanta ĉe tablo sur kiu, kuŝis skribilaro kaj paperfolioj. Laŭ ordono de Robert-Houdin, ĝi prenis plumon, trempis en la inkujon, kaj skribis respondojn al ĉiajn demandojn. Fine, ĝi subskribis : « Robert-Houdin » per skribo tute simila je tiu de la mekanikisto.

Multaj estis la aŭtomataj aparatoj konstruitaj de la juna horlogisto. Unu eĉ, estis multope vendita. Ĝi konsistis el ordinara vekhorloĝo kun malgranda

skatolo. Je la dezirita horo, la sonorilo funkciis kaj, samtempe, eliris el la skatolo flamanta kandel. Ĝi estis nomita la « vekilo-fajrilo ».

—o—

LA FANTASTAJ VESPEROJ DE PALAIS ROYAL

Tia estis la nomo de la spektaklo, kiun Robert-Houdin prezentis en propra teatro, kiun li instalas en « Palais-Royal » (Reĝa Palaco). Tiam — li estis 40-jara — li realigis longe prirevitan projekton. Dum tiuj « fantastaj vesperoj » estis montritaj aŭtomatojn, klasikajn sorĉaĵojn, kaj eksperimentojn vere eksterordinaraj.

La spektaklo estis belega, arta, ne nur pro la « mistero », sed ankaŭ pro la delikata gusto de la dekoracio kaj de la uzitaj aparatoj. La etoso mem estis plaĉa, agrabla. La iluziisto tute renovigis la malnovan arton trompi la publikon.

For la scenejon supermeblitan de tabloj kaj tabletoj malaperantaj sub ĝisteraj tapiŝoj! For la arkaikajn figurojn de lunoj, steloj, sunoj! For la strangan bestojn, similaj je drakoj, krokodiloj, k.t.p.! Nun la magiisto aktoras en bela salono laŭ stilo « Louis XV », blanka kaj ora; nur unu granda tablo, du tabletoj kaj du konzoloj, ĉiuj sen tapiŝoj.

For ankaŭ la tremetantajn lumojn de kandeloj duonkaŝitaj kaj lasantaj duonombre sur la scenejo! Helaj lampoj plene lumigas la blankan salanon.

La sorĉisto ne plu estas vestita per longa nigra robo stelumita; li ne plu surportas altan pintan ĉapelon kun duonlunoj kaj kometoj. Robert-Houdin aperas en eleganta lastmoda frako, vera « munduma homo ». Li ja estas bela, impresiga viro kun dominantaj kaj magnetaj okuloj, kun afabla kaj persvada voĉo. Li alparolas la ĉeestantaron per flua, sennerara, belstila parolo kaj asertas, ke li posedas supernaturajn kapablojn. Oni ja scias, ke lia spektaklo konsistas nur el lertaj artifaĵoj, sed oni fariĝas komplezaj komplicoj de la iluziisto.

Tiuj linioj el grava pariza tagjurnalo montras la entuziasmon naskitan de la nova spektaklo :

« En la galerio de Valois, en Palais-Royal, estas unu sorĉisto... La sorĉisto nomiĝas Robert-Houdin... vera sorĉisto, reala sorĉanto, garantiita kaj kontrolita, kiu faras miraklojn videblaj per viaj okuloj ».

—o—

SCIENCO HELPAS MAGION

Kompreneble, multaj el tiuj « mirakloj » estis nur artifaĵoj, « truko » kiel oni diras en la teatra kaj kinematografia lingvo. Sed ili postulas eksterordinaran manlertecon akireblan nur per longa trejnad.

Unu el la fundamentaj sekretoj de la prestidigitita arto estas « enpolmado », t.e. kaŝi en la mankavo, en la polmo, malgrandajn objektojn. Kia estu la pozicio de la mano, la publiko tute ne povas vidi la enpolmitaĵon.

Ankaŭ, iluziisto. uzas potencon psikologian rime-

don : sugestio. Robert-Houdin posedis realan prestiĝon kaj havis superan sugestian kapablon.

Sed lia granda supereco super la aliaj magiistoj fontis el lia klereco, kaj el racia, scienca aplikado de naturaj leĝoj. Elektra scienco estis apenaŭ naskiĝinta, kaj fakte tute ignorita de nesciencistoj. Robert-Houdin majstre uzis tiun novan energion. Ne jam ekzistis elektraj centraloj, kaj li mem produktis elektron per piloj, kaj baterioj, kiujn li mem konstruis. La necesaj dratoj estis facile kaŝeblaj.

Unu el liaj plej famaj eksperimentoj estis la « mistera kesto ». Ĝi estis malgranda fera kesto. Per gestoj de sia « magia vergeto », li ĝin igis tiom peza, ke neniu persono, kiom fortika li estu, povis ĝin levi el la sojlo. Temis nur pri tiam tute ne konata afero : elektro-magneto. Helpanto en la kuliso ŝaltis aŭ malŝaltis la kurenton laŭ ordono de la sorĉisto.

Aliaj artifaĵoj estis nur lertaj mekanikaĵoj. Tia estis lia eksperimento pri « anestezio ». Oni ĵus malkovris la anestezian povon de etero... Li flarigis flakonon (malplanan) al sia fileto. Eteraodoro estis flarebla de la publiko. La infano endormiĝis kaj ŝvebis en la aero. Oni retrovis la desegnojn de la aparato uzita, kiu estis kaŝita sub la vestoj de la knabo.

Tiel, kombinante supernormalan man- kaj fingro-lertecon, mekanikon, elektron, psikologion, Robert-Houdin faris nekompreneblajn miraklojn.

—o—

KLARVIDEKO

Plej sensaciaj kaj nekompreneblaj estis liaj eksperimentoj pri « klarvideko ». Li blindigis sian 12-jaran filon per dika bendo. Poste, li petis iun objekton de la spektantoj, kaj la infano priskribis la objekton. Tio estis farita milojn da fojoj, kaj ĉiam sukcesis. Montrita antaŭ la reĝino de Britujo, Victoria, kaj antaŭ la imperiestro Napoleono III, neniam la knabo eraris malgraŭ la kaptiloj provitaj kontraŭ li de la korteganoj.

Demandite, Robert-Houdin respondis kun sekreta rideto : « Mi iel korespondas kun la knabo ». Li tamen diris, ke li kaj lia filo longe trejnadis sin per tio, kion li nomis « percepto per aprezo » ; t.e. per sola ekrigardo vidi kaj detale memori multajn objektojn (ekzemple en vitrino de magazeno). Multaj magiistoj, por eksperimentoj de « transsendo de penso » uzas kodon, simplan laŭ principo sed komplikita laŭ praktiko. Kiam la artisto parolas al la publiko aŭ al sia helpanto, la vortordo de la demandoj, akcentado de iu aŭ alia vorto havas specialan signifon ; tiel, oni atingas mirigajn efektojn. Sed, eraroj estas neeviteblaj, ĉar la ebleco estas limigitaj malgraŭ la amplekso de tiu kodo.

Nu, neniam la filo de Robert-Houdin eraris ; kaj neniam la patro faris publike tian eksperimenton kun alia persono. Ĉu telepatio ? Eble, la nova scienco « metapsikologio » povos iam doni sciencon respondon al tiu nesolvita demando.

E. MOTILLO (daŭrigota).

Konservitaj Homoj

La franca verkisto Edmond About, kies « Rego de la Montoj » estis tradukita en esperanto, rakontis en sia romano. « La Viro kun rompita orelo », ke biologo kaŝe transportis kolonelon antaŭe glaciigitan kaj lin revivigis post pluraj jaroj. En tiu tempo « frido-kuracado » estis nur hipotezo. La franca biologo Claude Bernard jam en la tempo de About provis fridigi ranojn kaj ilin revivigi sed ne sukcesis. Nun, jam de pli ol dek jaroj, dank'al la laboroj de pluraj serĉistoj, el kiuj la franca kirurgo Henri Laborit, la aplikado de tiu tekniko fariĝis kutima.

Surbaze de la sciencaj atingoj, la usona profesoro Robert C. W. Ettinger imagis la logikajn sekvojn, dirante, ke la scienca uzado de fridigado malfermas la pordojn al la senmorteco. Jam en 1930 la soveta biologo Metalnikoff provis montri, ke senmorteco ekzistas en la naturo, ĉar la unuĉelaj estoj daŭre reproduktiĝas per divido kaj pro tio estas senmortaj.

La eksperimentoj montris, ke la energio eluzita en unu sekundo, povas daŭri dum pluraj jarcentoj, kiam la temperaturo alproksimiĝas al la absoluta nulpunkto (- 270 centigradoj). Oni sukcesis revivigi bakteriojn 600 milion-jarajn trovitajn en sal-kristaloj en Irkoustsk. La nuna stato de la serĉado ebligas Prof. Ettinger aserti, ke senmorteco estas jam realo. Jam estas certa la fakto, ke korpo povas esti nedifinite konservita en likvida heliumo. Plie oni povas konjekti, ke post pli malpli longa tempo medicino kapablos ĉion kuraci. Konsekvence la homo faru disponojn por ke oni konservu lian korpon en superfrigorŝranko tuj post lia morto, atendante la venkon de la medicino. Tio estas veto simila je tiu de Pascal : nenio perdota, ĉio gajnota.

Ĉu ne ekzistas danĝeroj ? Ĉu la glaci-kristaloj ne difektos la ĉelojn ? Necesas nur, ke la fridigado estu sufiĉe rapida. Jean Rostand asertas, ke oni povas forigi tian danĝeron per instilado de glicerino. La vera danĝero estas la re-

varmigo. Sed tio estas flankafero solvenda nur antaŭ la tempo, kiam la medicino kapablos kuraci la kanceron kaj rejunigi la ĉelojn.

Alia problemoj estas la stokado de milionoj da korpoj. Kie ? Ĉu en la Antarktiko ? La temperaturo tiea ne ebligas kompletan haltigon de la maljuniĝo-proceso : ĝi ne estas sufiĉe malalta. La teknikoj ebligantaj la necesajn malaltajn temperaturojn estas multekostaj. Profesoro Ettinger ankaŭ tiun flankon de la problemoj studis. Li rimarkis, ke en Usono, 80 procentoj de la homoj estas embalamigitaj post sia morto. Tio estas multekosta ĉar oni flankenlasas nenium detalon : la ĉerko-vendistoj reklamas pri la kvalito de la matracoj ; la posedantoj de tombejoj pri la komforto de la tomboj ; tajloroj faras specialajn kostumojn surhaveblaj eĉ en kuŝa pozo. La sumoj elspezitaj por enterigo varias de 1.000 ĝis 6.000 dolaroj. La fridigado en heliumo koston 1.250 dolarojn. Ĉiujare estos necese anstataŭigi la vaporigintan heliumon : 480 dolarojn. Profesoro Ettinger opinias, ke ĉiu homo devus antaŭvidi 8.500 dolarojn por sia « reviviga buĝeto ». La usona profesoro antaŭvidas la fondadon de Asocio de Estantaj Senmortuloj kaj la kreadon de frido-ĉambregoj, kiuj fariĝus pli kaj pli nombraj ol la hospitaloj !

Ĉu ne estas granda risko de renverso de la filozofiaj, religiaj, juraj bazoj de nia civilizo ? Teologo respondis « Teorie, la Eklezio ne povas kondamni pure sciancan aventuron. Neniu asertis, ke la revivigo, neniam plu mortos. » Sed supozu, ke persono trafita de nun nekuracebla malsano deziras esti fridigita antaŭ sia morto. Ĉu tio ne estas memmortigo ? Se patrino deziras, ke ŝia infano, trafita de tia malsano, estu fridigita, ĉu tio ne estas mortigo ? Inverse, ĉar temos ne pri vera morto sed pri portempa ĉesigo de la vivo, ĉu la heredantoj povos ricevi heredaĵon ? Ĉu la familiaĵoj rajtos ricevi la viv-asekurojn ?

Kiom da demandoj ! La respondoj necesigas veran reprimon de la bazoj de nia socio.

El artikolo aperinta en « Planete »

Belarta Konkurso 1962, en Kopenhago

Branĉo : ORIGINALA POEZIO.

TRIA PREMIO.

ĈE L' LABOREJ' DE L' HORLOĜISTO

Ĉe l' laborej' de l'horloĝisto
horoj sin distras dank' al domen',
kaj olda Kronos, ruza sorĉisto,
apud horloĝo, sur breta firsto,
kaŭtras en dolĉa dorma festen'.
Gilte, ĉe l' muroj, falas peziloj,
kaj pendol' faras : **tak-tak, tak-tak...**
dum sur la tablo., inter pinĉiloj,
la vekhorloĝoj — voĉbasaj griloj —
senĉese ĉirpas : **tik-tak, tik-tak,**
tik-tak, tik-tak, tik-tak, tik-tak...

La labormastro, viro prudenta,
— la kap' klinita, l' okul' atenta
tra la kristalo de la luepo —,
gratas la kernon de brakhorloĝo, orbela kreo.
(Dekkvin rubenoj. Lukse kvalita materialo.
Rompiĝis akso kaj la risorto de la spiralo).

La laboristoj,
veraj artistoj,
la ŝtalajn aksojn fiksas en orto,
kaj premas benojn de puŝrisorto
per tuja streĉo : **rak, rak, rak, rak...**
kaj tiel gaje, sub ciflerplatoj,
aŭdiĝas reŝ la koraj batoj
de l' brakhorloĝoj : **tik-tak, tik-tak,**
tik-tak, tik-tak, tik-tak, tik-tak...

En alta breto polvokovrita
horloĝ' kaprice filigranita
pendas de l' beko de marabu';
alia restis saĝe fiksita
sur porcelana ventra hindu';
kaj ĉe l' fenestro de kastelturo
kukol' aperas, vigla l' alkuro,
por, ĉiuhore, kanti : **ku-ku !...**

Kaj meze de l' mildentaj radoj,
aksoj, risortoj kaj tiktakadoj,
la horloĝisto, per takt' prudenta,
— la kap' klinita, l' okul' atenta —,
muntas la etajn fajnajn pecetojn :
la dentradaron, la klikradetojn,
la streĉbutonojn, ŝraŭbojn, frapilojn,
aksojn, risortojn kaj hormontrilojn...
Iom post iom al viv' horloĝa venas la sang'.
Per lanta ĥoro
plursonorila, kantas la ĥoro :
Tang ! Tang ! Tang ! Tang !...

Ho, laborejoj de l' horloĝistoj,
doktaj sanktejoj de l'akurataj kronometristoj,
plenaj de prava
aspekto grava,
en kies navoj la ritmo iĝis virta saĝeco.
Ho, sobraj temploj de l' Ekzakteco,
tiu diino
de la maŝino,
tiranin' kiu, pecon post peco,
tondas per bluaj eternondiloj
la fadeneton de l' Eterneco
inter la nadoj de l' du montriloj.

Noblaj sanktejoj de la laboro !
Sur viaj tabloj, kun ĝoj' en koro,
horoj sin distras dank' al domen',
kaj l' olda Kronos, ruza sorĉisto,
apud horloĝo, sur breta firsto,
kaŭtras en dolĉa dorma festen'.
Kaj ĉe l' fenestro de l' kastelturo
kukol' aperas, vigla l' alkuro,
por ĉiuhore kanti : **ku-ku !...**
dum sur la breto polvokovrita
kun horloĝ' sia filigranita
la bek' oscedas de l' marabu'.

Kaj ĉe l' norioj de l' ciflerplatoj,
kvazaŭ mulparo laca je batoj,
ambaŭ nadletoj giras sen hast',
strebe oscilas la spiraloj,
risortoj puŝas al korbatadoj,
kaj ĉie sonas, kiel aŭbadoj,
la malagordaj notoj de l' Jaz :

tik-tik, tik-tik,
tik-tik, tik-tik,
tik-tak, tik-tak,
tik-tak, tik-tak...

Ku-ku ! Ku-ku !... Rinnnnn ! Rinnnnn !...

rak, rak, rak, rak...

Tin-tin, tin-tin, tin-tin, tin-tin...

Tik-tak, tik-tak,
tik-tak, tik-tak,
tik-tak, tik-tak,
tik-tak, tik-tak...

He l' horloĝistoj ! Ĉesu l' labor' !
En kariljono sonis la hor' !
Ripozu, do !

Do,
si, la, sol, fa, mi, re, do.
Do,
si, la, sol, fa, mi, re, do.
Do,
si, la, sol, fa, mi, re, do.

Tang !...
Tang !...
Tang !...
Tang !...
Tang !...
Tang !...

Originale verkis :
ALVARO DE ORRIOLS.

GRAVAJ



DATREVENOJ


Antaŭ 400 jaroj naskiĝis en Cremona :

Claudio MONTEVERDI. — Tiu famekonata itala komponisto estis dum 30 jaroj la kapelestro de la baziliko Sankta Marko en Venecio. Li disvastigis la novajn sia-epokajn muzikajn formojn per siaj religiaj komponaĵoj kaj ĉefe per siaj opero-kreaĵoj.



Antaŭ 100 jaroj naskiĝis en Königsberg :

Käthe KOLLWITZ. — Tiu pentristino studis en Berlino kaj Munkeno, estis unue influata de la naturalismo de Max Klinger. Ŝi faris desegnojn pri la milito de la kampanoj, la ribelo de la teksistoj, faris kvardek mem-portretojn kaj desegnojn pri sociaj kritikoj. Ŝi estis reprezentantino de la proletara naturalismo kiel Uhde, Liebermann kaj Zell.



Antaŭ 85 jaroj naskiĝis en Oranienbaum :

Igor Feodorowitch STRAVINSKY. — Igor Stravinsky, rusa komponisto kaj orchestrestro ricevis la Sibelius-Oran Medalon en 1955. Li estas la plej populara el la « modernistoj ». Per tiu medalo oni omagis la plej mirindan talentulon pri moderna muziko kaj muzikiston, kies verkojn kaj personecon oni ne povas « klasi ».

La Steloj

Rakonto de Paŝtisto - A. Daudet

En la tempo kiam mi gardis la brutojn sur Luberon (monteto), mi restis, semajnojn plenajn ne vidante kiun ajn, sola, en la paŝtejo kun mia hundo Labri kaj miaj bestoj.

De tempo al tempo, la ermito de la monto Uro ĝis tien venis por serĉi kreskaĵojn sanigajn, aŭ mi ekvidis la vizaĝon nigran de ia karbisto Piemontana; sed, ili estis naŭvuloj, silentemuloj por longa izolo, perdintaj la kutimon paroli kaj nesciantaj kion oni diras en la malsupraj vilaĝoj kaj en la urboj.

Sekve, je ĉia dekkvina tago, kiam mi aŭdis sur la vojo, kiu supreniras, la sonorilojn de l'mulino kiu alportis al mi nutraĵojn, kaj kiam mi vidis aperantan, iom post iom, sur la monto, la kapon ĝojan de servo de nia komuna mastro aŭ la kuŝon flavruĝan de l'onklino Norad, mi estis vere tre feliĉigata. Mi rakontigis al ŝi la novaĵojn de l'malsupra lando, la baptitojn, la edziĝojn, sed kio interesis min precipe estis scii tion, kio fariĝas la filino de miaj gemastroj, nia fratilina moŝto Stefanet, la plej bela el la belulinoj ekzistantaj je dek kilometroj ĉirkaŭe. Sajnante ke mi ne tro min interesis pri tio, mi demandis ĉu ŝi iras ofte al la festoj, al la vilaĝanaj kunvenoj, ĉu alvenas al ŝi multaj ŝvatantoj: kaj, al tiuj, kiuj demandos min pri tio, kio rilatis tiujn aferojn — al mi, malriĉa paŝtisto de l'monto — mi respondos ke, mi estis dudek-jara, kaj ke Stefanet estis tio, kion mi estis vidinta plej belan dum mia vivado.

Sed, ian dimanĉon, kiam mi atendis la provizaĵojn, okazis ke ili alvenis malfrue. Matene, mi diris al mi: La granda meso kaŭzas tiun malfruon. Poste, ĉirkaŭ la tagmezo, venis granda pluvego, kaj mi pensis ke la mulino ne povas alveni pro la malbona stato de l'irejo. Fine, ĉirkaŭ la tria horo, post kiam la ĉielo heliĝis kaj la monto brilis per akvo kaj suno meze de la gutado de l'pluvo kaj la defluado de l'riveretoj plidikigitaj, mi aŭdis la sonorilojn de l'mulino sonorantajn tiel gaje, tiel vivplene kiel la granda preĝeja sonorilaro en Pasktago. Sed, ne estis la malgranda Miaro nek la maljuna Norad kiu kondukis. Estis... tion divenu?... nia fratilino mem sidanta inter la lignaj korkoj, tute roza pro la aĉero de l'monto kaj la malvarmeto de l'pluvego.

La malgranda Miaro estis malsana, kaj, onklino Norad¹ pasigis kelkajn tagojn ĉe siaj infanoj. La bela Stefanet sciigis al mi ĉion tion ĉi, malsuprenirante de la mulino, kaj ankaŭ, ke ŝi alvenas malfrue tial ke ŝi estas perdinta sian vojon; sed, sin vidante tiel bele vestita, kun ŝia florita rubando, ŝia robo brila kaj siaj punktoj, ŝajnis ke ŝi estis restinta plivere en ia dancejo ol, serĉinta sian vojon inter la arbetaĵoj. Ho! la beleaga kreitaĵo! Miaj okuloj ne povis ĉesi sin rigardi. Estas vere ke neniam mi vidis ŝin de tiel proksime. Ilafoje dum la vintro, kiam la brutoj estis sur la ebenaĵo kaj kiam, vespere, mi reeniris la domon por vespermangi, ŝi tra-

pasis rapide la mangoĉambron, ĉiam bele vestita kaj iom fiereta, ne tre parolante al la geservistoj. Nun, mi ŝin havis antaŭ mi, por mi sola, ĉu tio ne estis ne sufiĉa por malprudentiĝi?

Post kiam Stefanet malkakis la provizaĵojn el la korboj, ŝi ĉirkaŭrigardis vidame. Iom detirinte sian belan robon kiu eble makuliĝus, ŝi eniris la parkon volis vidi la lokon kie mi kuŝadis, la manĝejon por la paŝlo, la ŝafan pelton, mian paŝtobaston kaj mian pafilon.

« Estas do tie ĉi kie vi vivadas, mia bona paŝtisto? ». « Kiel vi sendube enuas, ĉiam sola? Kion vi faras? Pri kio vi pensas? »

Min logis respondi: « Pri vi, maŝtrinetto! ». Kaj mi ne estus mensoginta sed mi estis tiel konfuzita ke mi ne povis trovi eĉ unu vorton. Mi tre kredas ke ŝi tion rimarkis kaj ke, la malbonulneta penadis ankoraŭ por pligrandigi mian maltrankvilecon per siaj malicaĵoj.

« Kaj via amatino? paŝtisto! ĉu ŝi venas iafoje vin viziti? ĉu ŝi estas la ora kaprino aŭ tiu « feino Esterel kiu kuras nur sur la supro? ».

Kaj ŝi mem — ĉar ŝi, renversinte la kapon, bele lege ridis kaj estis tiel rapide malsuprenironta ke ŝia vizito fariĝis kvazaŭ ekapero — parolante al mi, rememorigis tute perfekte la feinon Esterel'on.

« Adiaŭ, paŝtisto! ».

— « Bonan tagon! maŝtrinetto! ».

Kaj ŝi forveturis reen, kunportante siajn korbojn malplenajn.

Kiam ŝi malaperis ĉe l'deturniĝo de l'voĵeto, ŝajnis al mi ke la ŝtonoj derulante sub la hufoj de l'mulino falis unu post la alia sur mian koron. Mi ilin aŭdis... longe... kaj ĝis la fino de l'tago, mi restis kvazaŭ dormetante, senmove, pro la timo ke mia revo eliru. Ĉirkaŭ la vespero, kiam la bestoj sin premis unu kontraŭ la alia, blekante, por eniri la parkon, mi aŭdis vokon en la malsupraĵo, kaj mi vidis aperantan nian fratilino ne ridetantan kiel antaŭe, sed tremantan pro malvarmo, timo kaj malseko.

En la fundo de l'valo, ŝi estis trovinta « Sorg'on » superbordiginta pro la pluvego kaj, volinte transiri, malgraŭ ĉio, ŝi estis riskinta droni. La plej terure estis ke, en tiu nokta horo, estis neeble reiri hejmen, ĉar nia fratilino ne povus sola trovi la vojon kaj mi ne povis forlasis la bruton. La ideo pasigi la nokton sur la monto multe, maltrankviligis ŝin, precipe pro la malkvietiĝo de ŝiaj gepatroj. Mi sin retrankviligis kiel mi povis: « En Julio, la noktoj estas mallongaj, maŝtrinetto! Estas nur malagrabla momento por pasigi! ».

Kaj mi ekbruligis fajron por sekigi ŝiajn piedojn kaj ŝian robon tute malsekigitajn de la akvo de « Sorg ». Poste, mi alportis kontraŭ sin lakton kaj fromaĝon, sed la kompatindulneco pensis nek revarmiĝi, nek manĝi, kaj vidante la larminojn kiuj plenigis ŝiajn okulojn, mi estis ploropreta — ankaŭ mi.

Dume, noktigiĝis. Restis nur sur la supraĵo de l'montoj polvo de suno kaj lumaj vapornubo ĉe la flanko kie la suno kuŝiĝis.

Mi volis ke nia fraŭlino eniru la parkon por ripozi. Etendinte sur la pajlon belan felon tute novan, mi deziris al ŝi « bonan nokton », kaj mi sidis ekstere antaŭ la pordo.

Malgraŭ la fajra amo kiu min bruligis, nenia malbona penso venis al mi, kaj mi havis nur grandan fieracon pensante ke, en angulo de l'parko, proksime de l'bruto kiu ŝin rigardis dormi, la filino de miaj gemastroj — kiel ŝafidineto kara kaj blanka, pli multe ol ceteraj — ripozas je mia gardo. Neniam la ĉielo ŝajnis al mi tiel profunda, la steloj tiel brilaj!...

Subite la parkbarilo malfermiĝis kaj la bela Stefanet aperis. Ŝi ne povis dormi. La bestoj bruas, sinmovante, aŭ blekis, revante. Ŝi pli amis veni apud la fajro. Tion vidante, mi metis sur ŝiajn ŝultrojn mian kaprinfelon, mi revivigis la fajron kaj ni restadis sidante unu apud la alia, nenion dirante.

Se vi estus pasiginta iam la nokton, sub la belaj steloj, vi sciis ke, dum nia dormo, mondo almirinda ekvekiĝas en la izolo kaj la silento. Tiam la fontoj kantas pli multe distingeble, la iagetoj ekbruligas maldikajn flamojn. Ĉiuj spiritoj de l'mondo disiris laŭvole: en la aero estas ĉifetoj, bruetoj, apenaŭ rimarkeblaj, kiel se oni aŭdis plilongiĝi la branĉojn, kreski la herbon. Dum la tago estas la vivo de l'animuloj, sed dum la nokto estas la vivo de l'senanimuloj. Kiam oni ne estas kutimigita je tio, oni terurigas.

Tial, nia fraŭlino estis tute tremanta kaj sin preme metis apud mi, tuĵ kiam ŝi aŭdis la plej mallaitan bruon. Unu fojon, melanholia krio longedaŭra elvenante el la iageto kiu brilis malsupre, supreniris ĝis ni, onde. En la sama momento bela stelo glitis super niaj kapoj en la sama flanko kvazaŭ la plendo kiun ni ĵus aŭdis, kunportis kun si lumajon.

« Kio tio ĉi estas? » demandis Stefanet mallaitete.

« Ĝi estas animo kiu eniras la paradizon, mastrineto! ».

Kaj mi faris la signon de l'kruco.

Ŝi faris same kaj momente restis, kun la kapo levita, meditante.

Poste ŝi diris al mi « Estas do vere, paŝtisto, ke vi estas sorĉuloj ĉiuj vi »? « Neniol, nia fraŭlino, sed tie ĉi oni vivadas pli proksime de la steloj kaj

ni scias tion, kio okazas ĉe ili, pli bone ol scias la ebenajanoj ».

Ŝi rigardis ĉiam supren, apogante la kapon sur la mano, kaj ĉirkaŭprenite per la kaprinofelo, kiel paŝtisto ĉiela.

« Kiom da steloj! Kiel estas bele! Neniam mi vidis tiom. Ĉu vi scias iliajn nomojn, paŝtisto? ».

« Jes, mastrineto! vidu, super ni, jen estas la Vojo de sankta Jakobo ». Ĝi komenciĝas en Francujo kaj kondukas rekte en Hispanujon. Sankta Jakobo de Galico ĝin strekis por montri ilian vojon al brava Karolo Granda, kiam li bataladis kontraŭ la Sarazenoj? Malproksime de tie, vi trovas la « Veturilo de l'animoj » kun ĝiaj kvar aksoj brilegantaj. La tri steloj, kiujn vi havas kontraŭ vi, estas la tri « bestoj » kaj tiu ĉi, tute maldika, apud la tria, estas la veturigisto. Ĉu vi vidas ĉirkaŭe tiun pluvon de steloj kiuj falas? Estas la animoj kiujn ne volas havi ĉe si la Bona Dio! Iom pli malsupre, jen estas la « Rastilo » aŭ la « Tri Reĝoj ». Ĝi al mi konigas la horon. Nur ĝin rigardante mi scias ke nun estas noktomezo. Ankoraŭ iom pli malsupre, ĉiam al la sudo, brilas la « Johano de Milano » la lumigilo de l'Astroj. Pri tiu stelo jen estas tio kion, la paŝtistoj rakontas: « Oni diras ke, nokte, Johano de Milano, la Tri Reĝoj kaj la « Kokidisto estis invititaj de stelo, ĝia amikino. La Kokidisto dezirante reveni pli rapide eliris unua kaj prenis la vojon altan. Rigardu supren en la fundo de l'ĉielo. La Tri reĝoj pasis laŭlarĝe kaj ĝin renkontis, sed tiu mallaborema Johano de Milano kiu estis malbone dorminta, restis malantaŭe, kaj kolere ĵetis sur ilin sian bastonon por ilin haltigi.

Estas la kaŭzo kial oni nomas ankaŭ la Tri Reĝoj'n: la Bastono de Johano de Milano. Sed la plej bela el ĉiuj, mastrineto, estas la nia, « La Paŝtista Stelo ». Ĝi lumigas al ni antaŭmatene, kiam ni elirigas la brutaron kaj ankaŭ vespere, kiam ni ĝin reenirigas? Ni ĝin nomas ankaŭ « Magelon » la belan Magelon kiu kuras al Johano de Milano kaj edziĝas je ĝi ĉiun sepan jaron.

« Kiel paŝtisto! Ĉu ekzistas edziĝoj de steloj? ».

« Jes, jes, mastrineto!...

Kaj kiam mi provis klarigi al ŝi tion kio estas tiuj edziĝoj, mi sentis ion malvarmetan kaj dolĉan kiu sin metas nepeze sur mian ŝultron. Estis ŝia kapo tute dormplena kiu sin apogis sur mi kun belega ĉifeto de rubandoj, de puntaj kaj de haroj ondigaĵaj. Ŝi restis tiel, senmove, ĝis la momento kiam la astroj paligis senbriligitе de la lumо de l'tago kiu supreniĝis. Mi, mi ŝin rigardis dormantan, iom konfuzite, en la fundo de mi mem, sed sankte defendite de tiu hela nokto kiu ĉiam donis al mi nur bonajn pensojn.

Ĉirkaŭ ni, la steloj daŭrigadis sian ŝientan iradon, obeaj kiel granda brutaro, kaj momente, mi imagis ke unu el tiuj steloj, la plej malpeza, la plej brila perdis sian vojon estis sin metinta sur mian ŝultron por dormi.

(Tradukis : Noël AUBE).

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO :

Rezultoj (ni kore gratulas la gajnintojn) :

1. S-ro Giloteaux, Croix-Francujo, 146 poentojn (gajnis 2 semajnan senpagan restadon en Gresillon).
2. S-ro Captein, Den Haag, Nederlando, 143 poentojn (gajnis 1 semajnan senpagan restadon en Grésillon).

Sekvas :

3. S-ro Heine, Pollando, 142 p.
4. F-rino Robin, Francujo, 139 p.
5. S-ro Van der Lubbe, Nederlando, 137 p.
- S-ro Raynaud, Francujo, 137 p.,

k.t.p...

Bedaŭrinde kelkaj partoprenantoj sendis la solvojn nur ek de la dua aŭ ne sendis la lastajn. La konkurso konsistis el ok problemoj aperintaj en kvar sinsekvaj numeroj de la revuo.

Nova konkurso komenciĝos en oktobro.

SOLVOJ DE LA KONKURSO-PROBLEMOJ :

1. (Sept.-Okt. 66) :

Unua problemo. — « Dum la tuta daŭro de la historio, tio, kio agas, tio, kio estas, ne estas la logikaj abstraktaĵoj de la scienculoj, sed la aspiroj pli malpli malprecizaj de la agadaj homoj ». Kiu parolas tiel? Kio nescienculo, kiu, pro ia jaluzeco malŝatas la scienculojn? Ne! sed unu el la plej eminentaj pensuloj de nia tempo, la franca filozofo Boutroux.

Dua problemo. — Kontentigu je malgrando, kaj tenigu al modero.

2. (Jan.-Feb. 67) :

Unua problemo. — Suda rakonto. Mia estro devas aĉeti ĉiujare kvin barelojn da inko nur pro la punktoj, homoj kaj similaj signoj en la korespondado de nia firmao.

Tio signifas nenion. Mia estro ŝparas ĉiujare ok barelojn da inko nur pro la forlasado de tiuj signoj en la korespondado.

Dua problemo. — La trovotaj barbarismoj estis : Tavelo, Javelo, Neko, Ceko, Jodo, Dojo, Kroto, Pajo, Mejo kaj Panaro (almenaŭ, kiel simpla vorto).

Tria problemo. — Inspektoro ekzamenis klason pri la Biblio kaj deziris trovi, kion la infanoj sciis pri Absalom. Ili estis tre malkleraj, kaj ne respondis al liaj demandoj. Fine li demandis :

Kion havis Absalom, je pli granda grado ol aliaj? Neniu (aŭ neniu aŭ nenies) respondo. La inspektoro, kiu estis iom senhara (aŭ kalva), fingro-montris al sia kapo.

Pensu, li diris, li havis ion, kion mi preskaŭ ne havas. Kio ĝi estas?

Tiuj respondoj : « Cerbo! ».

Kvara problemo. — Ripetado estas la patrino de la sciado.

3. (Marto-Aprilo 67) :

Unua problemo. — Trovotaj proverboj :

1. Korvo al korvo okulon ne pikas.
2. Bona konscienco estas la plej mola kuseno.
3. Mano de infano rapide pleniĝas.
4. Bato de patrino ne longe doloras.
5. El fremda poŝo oni facile pagas.
6. Ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro.

Dua problemo. — La maŝinisto estas k-do Fortman.

AMUĴAJ PROBLEMOJ :

Solve de la antaŭa problemo :

Vorto ĉeno. — La trovotaj vortoj estas ; kolego, leporo, poliso ; likeno, kerubo, rubuso, butero, tenoro, nomado, makulo, kupono, poluso, lukano, karoto, rokokoto.

Nova problemo (S-ro Salasc) :

KRUCVORTOJ

Horizontale. — 1. Senorda konfuzo (r); stadio (r). — 2. Iskia neuralgio. — 3. Malpliiga sufikso (r); papago (r); prefikso. — 4. Posteularo (r); taĉmento da soldatoj (r). — 5. Bela floro (r); dentoskrapa malutila besteto (r). — 6. Fantazia imagaĵo (r); japana poemeto (r). — 7. Verba finaĵo; maldika intesta parto (r); ag-sufikso (r). — 8. Scienco pri riĉaĵoj. — 9. Ligotubero; en ludkartoj.

Vertikale. — 1. Nerekta demanda pronomo; ekstera aspekto de iu aŭ io (r). — 2. Stelforma signo. — 3. Numeralo; devizo (r); lirika poemo (r). — 4. Poseda adjektivo; rilatas al virino. — 5. Amaso; instrumento. — 6. Malgranda; inklina. — 7. Du trionoj de montra pronomo (r); maceru tekseblan planton; verba finaĵo. — 8. Poemeto. — 9. Poeziverkisto (r); faroj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
I									
II									
III									
IV									
V									
VI									
VII									
VIII									
IX									

ENIGMO

Laŭ la sekvantaj difinoj trovi 16 vortojn; al ĉiu vorto trovita almetu unu plian literon, ĉiam en la saman lokon, t.e. la antaŭlastan por konstrui novajn vortojn. La legado, en ordo de sinsekvo, de la 16 literoj aldonitaj, prezentos la trovotan maksimumon.

Difinoj. — 1. Ekstera krusto de arba trunko. — 2. Parto de homa membro. — 3. Aro da du objektoj aŭ estuloj. — 4. Saltanta insekto. — 5. Senlima daŭrado. — 6. Nitria klorido. — 7. Eksterna flanko de nazo. — 8. Aperturo en tegmento. — 9. Konifera arbo. — 10. Granda ornamo. — 11. Ĝi ofte okazas dum la dormado. — 12. Intermorta malalta vastaĵo. — 13. Peruvia remaĉulo. — 14. Senvosta amfibia besto. — 15. Cambrego. — 16. Sovaga eŭropa bovo.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« La esenco de l'adjektivo estas esprimi **econ**, **kvaliton**. Tiu de la verbo esprimi agon aŭ staton.


Kiam do oni volos esprimi **econ**, oni uzos la formon **a** ; kaj kiam oni intencos esprimi **agon**, oni uzos la formon « anta » ».



— Vi estis ĉarma, Fraŭlino, ĉarmanta ĉiujn.




— Jen respondo al embarasa demando, embarasanta eĉ lertajn homojn.



— Tiu eltrovaĵo estas tre interesa, certe interesanta la navigistojn.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (39 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (70 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (10 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczí, Nabrezie Metoda 1707/16, PŘEDVIDZA (1,50 us. dol.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (10 kr.).
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (6,2 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr. 33, - pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (5,6 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, la, BARCELONO (77 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (840 lir.).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1260 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (5 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg. 56, LAMBERTSEDER (10 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (50 zł.).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk. 157007 (8,4 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (1,50 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (1,50 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo